

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas Claude Gacond, kiu respondas al mesaĝoj de kelkaj geaŭdantoj.

Kiam mi prelegas, mi ŝatas rigardi la vizaĝojn de miaj geaŭdantoj, kaj post la prelego mi ŝatas malfermi diskuton por pliigi la kontakton, kiu eknaskiĝis inter ni. Por radio-prelegisto bedaŭrinde tiuj eblecoj ne ekzistas. Li sidas antaŭ mikrofono. Li estas sola. Mankas al li la kontakto kun la publiko, kontakto necesa. Kaj post la prelego li sin demandas, ĉu li kapablis vekti intereson ĉe siaj geaŭskultantoj.

Tri afablaj leteroj pruvis al mi, ke mi ne predikis en la dezerto, sed ke en tri lokoj oni aŭskultas la programon de la svisa kurtonda radiostacio. Kaj hodiaŭ, dum mi parolas, mi vidas vin, karaj geaŭdantoj, antaŭ via radioaparato, kaj mi havas la impreson, ke anstatataŭ muroj ĉirkaŭ mi troviĝas gesamideanoj.

El Pontarlier (Francio) venis bondeziroj de la familio Turin. El Besançon (Francio) venis afabla vorteto de sinjorino Kohler : « Viajn paroladojn, ŝi skribas, kiujn mi plezure aŭskultis, mi multe ŝatis. » Dankon ! francaj samideanoj, kaj sciu, ke ankaŭ mi plezure aŭskultos vin letere.

El Lausanne (Svislando) venis alia letero, kiu estas tre interesa. Al ĝia plendo mi provas doni klarigon. Jen kion skribas sinjorino Chavan : « Brave ! sinjoro Gacond, vi tre bone parolis al mi merkrede pri edukspertoj ; mi grandvalore taksis tiun prelegon (estis la prelego, kie mi parolis pri la pensstrukturo de la gelernantoj). Kompreneble mi estas instruistino (daŭrigas sinjorino Chavan). La unuan merkredon de la jaro, kun emocio vi funebris s-ron Ecabert, kun kiu mi konatiĝis en Münchenwiller. Mi ŝatis lian talenton kaj estimis lian honestecon. »

Kaj nun, karaj geaŭskultantoj, jen eble diro, kiu respondas al via sperto. Ŝi diras: « Sed mi devis alproksimigi mian orelon apudege de la aparato, sed baldaŭ pli fortaj ondoj kun abomeninda ĵazmuziko konfuzmiksas kaj malharmoniiĝis kun via korprema disaŭdigo, kiun mi ne povis selekti. Ofte, tro ofte, la svisaj dissendoj estas kvazaŭ neaŭdeblaj, kvankam mi perfekte kaptas Varsovion, Romon aŭ eĉ Sofion. Kelkaj geamikoj el Lausanne ne plu provas aŭskulti Svislandon. Tamen la horo tre taŭgas, kaj viaj prelegoj, ĉu tiuj de s-ro Baur, ĉu la viaj, estas ĉiam altnivelaj kaj interesaj. Kial? Se vi havus tempon, ĉu vi povus klarigi al mi la kialon ?»

Kial en Lausanne oni malfacile kaptas la ondojn de la svisa kurtonda radiostacio ? La respondo povas esti tre simpla ; ĉar la svisa kurtonda radiostacio elektis ondojn por ekstervisaj teritorioj. Niaj esperantaj elsendoj devas konveni al tuta Eŭropo. Se oni elektus mezajn ondojn, kiel tiujn, kiujn uzas Sottens, Beromünster aŭ Monte Ceneri, tiujn ondojn bone kaptus svisoj, sed en pli malproksimaj regionoj (Ruslando, Nederlando, Sud-Francio, ekzemple) oni ilin preskaŭ ne plu povus kapti. Tiam la voĉo de Svislando ne aŭdiĝus tra la mondo !

Post tiu konstato mi volas provi klarigi al vi kiel sin dissendas la kurtaj ondoj. Sed permesu unue komparon. Vi certe iam amuziĝis dum montara ekskurso kii por reaŭskulti vin poste pere de la eĥo. La ondojn de via krio rokaro reflektis, kiel spegulo reflektas vian bildon. Ĉirkaŭ la tero okazas io tre simila. Je iu alteco (inter cent kaj tricent kilometroj) troviĝas tavolo el atom-eroj nomata jonizita tavolo. Estas dank'al tiu tavolo, ke sur la tero oni povas aŭdiĝi ĝis tre malproksime radioprogramon pere de la kurtaj ondoj. El la svisa kurtonda radiostacio, ekzemple, per elsendiloj ondoj estas dissendataj ĉielen. Kiam tiuj ondoj atingas la jonizitan tavolon, tiam ili estas reflektataj sur la teron, kiam ili atingas la teron, tiam ili ree estas reflektataj ĉielen, kaj denove la jonizita tavolo ilin reflektas teren. Tiel tiuj ondoj povas

ĉirkaŭiri la teron. Se tiu jonizita tavolo ne ekzistus, la dissenditaj ondoj perdiĝus en la universon, neniam ili revenus teren, kaj neniam svisoj povus paroli al japanoj pere de la radio.

Por bone povi kapti la kurtajn ondojn, oni devas povi ricevi ilin ne rekte, sed la reflektatajn ondojn. Bedaŭrinde Lausanne situas tro proksime de Berno, kaj tio ne eblas. Do la ondoj, kiuj rekte venas el la monto Schwarzenburg provas tamen enveni vian radioaparaton, sed ĉar via urbo troviĝas malantaŭ montetoj nomataj Jorat, tiuj ondoj nur malfacile atingas vin. La montoj formas ekranon. Vi nur ricevas la ondojn, kiujn nuboj aŭ hazardaĵoj vin reflektas. Pro tio tiuj ondoj konstante ŝanĝiĝas (nuboj moviĝas).

Bedaŭrinde la longeco de la ondoj estas tre proskimaj inter la diversaj elsendejoj, kaj niaj radio-aparatoj ofte ne kapablas ilin sufiĉe disigi. Tial ofte okazas, ke subite kurtonda dissendo estas fuŝata de alia programo, kiel okazis por vi dum mia adiaŭo al Charles Ecabert. Pro tio nia programo ripetiĝas sabate vespere.

Mi esperas, ke tiuj klarigoj ne tro malkuraĝigos vin, ke vi tamen regule provos aŭskulti la svisan kurtondan radiostacion, kaj se vi loĝas tro proksime de Berno por ricevi facile niajn ondojn, skribu al la aliaj svisaj radio-elsendejoj, por demandi kial ili ne ripetas por vi, esperantistoj, niajn prelegojn, kiel la svisa kurtonda radio ripetas diversajn programerojn de la regionaj svisaj elsendejoj.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond, la prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando responde al mesaĝoj de aŭskultantoj. Ĝis reaŭdo !

-oOo-